

EKO 2025

Bleko
kun eĥo

EKO 2025-11. Marto 11. Alkroĉaĵoj: La Torre, Lo Jacomo, UN75. Sume 802 KB

Lo Jacomo en Burundo

La vizito de François Lo Jacomo al Burundo estis tiel grava ĉar li venis por vidi la progreson kaj sukceson de la Esperanto-movado en Burundo.

La Ministrino bonvenigis nin kaj dankis nin pro tio, ke Esperanto ŝanĝas la vivon de multaj homoj en Burundo, nome de la indiĝena popolo. Ŝi aprezis la progreson, kiun faras la Landa Asocio en Burundo enkondukante la lingvon Esperanto en bazajn lernejojn.

Antaŭ ol fini sian vojaĝon s-ro François Lo Jacomo renkontis esperantistojn en Buĵumburo, el kiuj la plimulto estas membroj de la klubo 'Paca Armeo'. La bonvenigo estis varma, la burundaj esperantistoj aprezis lian alvenon kaj la viziton. Post paroladoj, ANEB proponis donacojn kunmetitajn de la tamburo de Burundo.



Aime-Patrick Makirakiza

SMG: Legu la plenan raporton en la alkroĉita ilustrita 4-paĝa dokumento.

Nepale, multnombre

Okazis la sesa **Speciala Ekskurso** ekde la fino de februaro. En ĉiu dua jaro okazas la **Himalaja Renkontiĝo**, same kiel la **Speciala Ekskurso**, kiu estas organizita por tiuj, kiuj ne povas marŝi en la montaro. **NEspA** organizis kurson en **Koteswar Multifaka Kolegio** kun ĉirkaŭ **40 gelernantoj**. Okazis alia kurso en **Little World Pre-School, Kadaghari**. Ni okazigis **tuttagan konversacian rondon**, kiun ĉeestis **32 gelernantoj**. Ili estos pretaj partopreni en la renkontiĝo por plue praktiki la lingvon. Jen bildo de tio:



NEspA planas sendi **dek membrojn** al la venonta **Universala Kongreso (UK)**. Iuj emeritoj montris intereson vojaĝi al **Eŭropo**, kaj ni laboros pri tio. La temo de la ĉi-jara renkontiĝo estas: *Revivigo, popularigo kaj interkultura*

kunligiĝo.

Tial, mi petas al vi ĉiuj subteni nian movadon, por ke **Nepalo estu en la unua rango en la mondo. 'Nepalo Unue!'** Sendu viajn bondezirajn mesaĝojn por la renkontiĝo! Ĉi-jare la Esperanto-movado ricevis grandan baton pro la forpaso de nia tre aktiva samideano **Renato Corsetti. NEspA** sentas sin orfa sen li, sed ni decidis sekvi lian ekzemplon kaj labori des pli vigle por la movado. La korpo de Renato ne plu estos inter ni, sed lia labormaniero kaj ideoj vivos ĉiam en niaj koroj.

Bharat Kumar Ghimire, Prezidanto, NEspA

Mesaĝo pri MASI

Antaŭ tridek jaroj, la 24-an de februaro 1995 en Moskvo estis fondita Esperanto-Klubo MASI, kiu de tiam restas la plej aktiva Esperanto-kolektivo en Ruslando. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2025/02/ruslando-63/>

Pakistanaj evoluoj

La 26-an de februaro, PakEsA sukcese okazigis la Unuan Estraran Kunsidon de la jaro 2025 en Lahore. Oni ankaŭ okazigis seminarion en la memoro de forpasintoj:

- La 21-jara Allama Muzter Abbasi
- D-ro Renato Corsetti, eks-Prezidanto de UEA kaj Honora Prezidanto de UEA.
- Javaid Ehsan, eks-Ĝen. Sek. de PakEsA kaj iama komitatano de UEA kaj Honora Prezidanto de PakEsA.

Shabbir Ahmad Sial, Prezidanto de PakEsA.

Torento el Toronto

Ni ĝojas anonci la Dulandan Kongreson de Esperanto (DLK), kune kun Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), kiu okazos de la 5-a ĝis la 14-a de julio 2025 ĉe Toronto Metropolitena Universitato. Ĉi-jare, sub la temo *Amikeco trans landlimoj*, esperantistoj el Kanado kaj Usono kuniĝos por festi niajn komunajn lingvon kaj kulturon. La kongreso estas organizita de Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kaj Esperanto-USA, kun la subteno de Esperanto-Toronto.

La programo inkluzivos prelegojn kaj diskutrodojn pri lingvo kaj kulturo, koncertojn kaj artajn prezentojn, librolanĉojn kaj ekspoziciojn, kaj amikajn kunvenojn kaj intensan Esperanto-kurson NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) kun oficialaj ekzamenoj
Vizitu: www.toronto2025.net por pliaj informoj kaj aliĝo.

La organizantoj de Toronto2025 Dulanda Kongreso

Renato rememore

La funebra ceremonio de Renato okazis la 3-an de marto. Por homoj, kiuj ne povos ĉeesti surloke, eblos spekti ĝin uzante la jenan ligilon:

<https://watch2.obitus.com/>; Uzantnomo: vero3909; Pasvorto: 014355

Anna L.

Premio La Torre anoncita

La juĝkomisiono de la Premio La Torre 2024, omaĝe al Profesoro Mauro La Torre (1946-2010), prezentas la rezultojn de la kvara eldono de la renoma konkurso pri esplorkomisiono en la kampoj, en kiuj profesoro La Torre dediĉis sian vivon.

La juĝkomisio unuanime decidis pri jenaj premiitoj: Sepcent eŭroj iras al Emmanuelle Richard kaj Axel Rousseau pro la esplorraporto:

Takso de interreta instruado al franclingvaj lernantoj per la KER-sistemo

La juĝkomisio laŭdas ĉi tiun esplorraporton pro ĝia rimarkinda kontribuo al Esperanto-instruado. La aŭtoroj prezentas signifan statistikan analizon, kiu konvinke montras la pli facilan lerneblecon de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj. Ilia metodologio estas rigora, la rezultoj estas praktike aplikeblaj, kaj la laboro donas valorajn perspektivojn por plibonigi la interretan instruadon de Esperanto, precipe al franclingvaj lernantoj, uzante la Komunan Eŭropan Referenckadron (KER-sistemon).

Honoraj Atestiloj estas transdonitaj al Tatjana Loskutova pro la esplorraporto:

Certaj apartaĵoj de reta Esperanto-instruado kaj al Aranka Laslo pro la esplorraporto: Inkluzivo en retaj kursoj de esperanto; Ekzemplo de kursaro en Serbio por miksitaj grupoj de vidantoj kaj nevidantoj.

Nome de la juĝkomisio, ILEI kaj la familio La Torre

SMG: Vidu pli da informoj en la alkroĉita PDF-dokumento.

Mondaj, ondaj jubileoj

En marto ni festos la jubileojn de **Povilas Jegorovas** (70 jaroj) kaj **Carlo Minnaja** (85 jaroj) kaj rememoros la forpasintajn prezidintojn de UEA **Hector Hodler** kaj **Ernfrid Carl Malmgren**, kaj la prezidinton de la Akademio de Esperanto **Théophile Cart** kaj aliajn meritplenajn esperantistojn. Legu la liston de Esperantaj memordatoj por marto 2025, kiun kompilis Aleksander Korĵenkov, en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/03/marto-12/>.

Universitataj intervenoj

Mart-eke okazis la 58-a kunspens(ig)ado pri kunsperto de Esperanto kaj universitatoj.

1. Radojica (radojica.petrovic.rs@gmail.com) prezentis la ILEI-simpozion, kiu okazos julie en Beogrado (<https://www.ilei.info/konferenco/2025/dua- Alvoko.pdf>). La temo estas *Artefarita intelekto kaj lingvolernado*. Jam aliĝis 60 partoprenantoj. En la sesio ni aŭskultis utilajn uzadojn de AI en la instruado de Esperanto, kunhavigitajn de Fransoazo (fransoazo@gmail.com). Estas invito al kolegoj aktive partopreni en la simpozio, pro kiu celo oni estu en kontakto kun Radojica aŭ Fernando Pita (magisterpita@gmail.com).
2. Viko (viko@civencia.io) anoncis la baldaŭan stariĝon de laborteamo pri la estonteco de la Fakultato pri lingvoj de la Université de l'Espoir en Kongo DR, kies rektoro estas Elisée Byelongo (ebyelongo@gmail.com). La fakultato estis ĝis nun gvidata de Renato, kun la partopreno, kiel instruistoj, de Fransoazo kaj Ahmad. La ĉefa celo estas kaj instrui Esperanton kaj instrui Esperante. Ĉiuj kolegoj estas invititaj partopreni en tiu teamo, kies frukto estu oficiale universitataj titoloj Esperante atingotaj. Tiuj, kiuj scivolemas pri ĉi tio, skribu al Elisée aŭ al Viko, tiel ke eblu laŭvole partopreni en la laborteamo.
3. Ilona (koutny.ilona@gmail.com) alportis la bezonon kalkuli je ia terminaro pri lernejoj kaj, ene de ĝi, rilate ankaŭ al universitataj gradoj kaj universitataj postenoj.

Oni diskutis pri la vasta realiĝo de vortoj kaj esprimoj, kiuj malsamas ne nur inter landoj sed ankaŭ ene de landoj.

La sperto daŭris 75 minutojn kaj estos videe spektebla en la jutuba kanalo de UEA (<https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5>),

Viko

Memore pri Claude Gacond

Tiu kunveno okazos en la 5-a de aprilo en la Urba Biblioteko, kie situas CDELI, la fama arkivejo. Ĝi estas organizita kune de SES kaj la Amikaro de CDELI. Vidu en

[Memorkunveno honore al Claude Gacond | Eventa Servo](#)

Matene okazos la ĝenerala kunveno de la Amikaro de CDELI.

Okazos la memorkunveno de la 14:30 ĝis la 17:00. Sekvos agrabla teumado en CDELI.

Mireille Grosjean, kun-prez. de Svisa Esperanto-Societo

EKO gratulas la elektitojn al la Komitato de UEA

La novaj komitatanoj B de UEA estas **José Antonio del Barrio** el Hispanio, **Marija Belošević** el Kroatio, **François Lo Jacomo** el Francio, **Wu Guojiang** el Ĉinio kaj **Espoir Kasati** el Kongo DR. La nove elektitaj komitatanoj B oficos ekde la malfermo de la ordinara kunveno de la Komitato en Brno.

SMG: La A-komitatanoj estas nomumataj de la aliĝintaj Landaj kaj Fakaj Asocioj. La C-komitatanoj estas nomumitaj de la A- kaj B-komitatanoj. Mi dum pluraj jaroj estis B-komitatano kaj poste, ĝis nun, C-komitatano.

Tago de la Gepatra Lingvo raportita en Ĉinio

El Popola Ĉinio raportas al la ĉina publiko la mesaĝon de UEA en la Internacia Tago de la Gepatra lingvo en la ĉina lingvo kaj Esperanto, jen:

<https://mp.weixin.qq.com/s/3mpl2DhW46NolG155-vZWQ> .

Chen Ji, Ĝenerala Sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo

===== vortoj: 985 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Eida Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.